STARTO 189

4 1999

**El la enhavo:**

Kongresaj mesaĝoj
Kongresa rezolucio
Kongresaj programoj
Kongresaj kunvenoj
Medicinistoj en Opava
SAT en Karlovy Vary
ILEI en Karlovy Vary
Forpasis Z. Křimský
Aboneblaj gazetoj

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**LA ASOCIA LIBROSERVO SERVAS AL LEGEMULOJ (ILEI - konferenco en K. Vary)**

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 6-foje jare. Abono 9 eŭroj (se aerpoŝte: + 2 eŭroj)

**E-mail de Starto:** starto@clavis.cz

**TTT de Starto:** www.clavis.cz/starto

**E-mail de ĈEA:** cea@tnet.cz

**TTT de ĈEA:** www.kuk.cz/cea/

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 200 Kč, B 100 Kč, D 50 Kč, E 50 Kč, F 4000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 490 Kč komencantoj, 450 Kč progresintoj. Aliĝoj: Esperanto, p.s. 1069, 111 21 Praha 1

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732

**Sekcioj de ĈEA:** junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaĵ-kolektantoj

**Komisionoj de ĈEA:** gazetara-informa, ekzamena

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

**IČO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:** 3330-021/0100, Komerční banka, Praha 2

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10, 747 05 Opava, tel: 0653/611 823

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso 02.9912126

**Vicprezidanto:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 05/4323 3047

**Sekretario:** Květa Krajíčková, Esperanto, p.s. 1069, 111 21 Praha 1

**Komitatano:** Lucie Karešová, Tylova 1262, 508 01 Hořice v Podkrkonoší

**Komitatano:** Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, distr. Hodonín, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507, vlada_hasala@iol.cz

**Komitatano:** Zdeněk Heiser, Na Nábřeží 45/25, 736 01 Havířov, tel. 069/6815253

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Ing. Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, (membrino: Libuše Krejčí)

**Ĉefdelegito de UEA:** Stanislava Chrdlová, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso 02.9912126

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724 0690 (nesignitaj artikoloj estas liaj)

**Lingva kontrolo:** Miloslav Pastrňák (pri nekorektitaj eraroj, precipe en lastminute almetitaj tekstoj, respondecas la redaktoro)


**Variabilní symboly pro platby ČES**

| | |
|---|---|
| **311** | expedice, úhrada koupených knih |
| **604.2** | písemné kurzy |
| **604.3** | předplatné Starto |
| **668** | dary svazu |
| **694** | členské příspěvky ČES |
| **694.1** | členské příspěvky UEA |
| **789.1** | sekce mládeže |
| **789.10** | sekce šachistů |
| **789.11** | sekce sběratelů |
| **789.13** | Scienca revuo |
| **789.15** | ediční fond |
| **789.17** | sekce nevidomých |
| **789.3** | sekce železničářů |
| **789.7** | sekce pedagogů |
| **789.71** | ILEI (+ Internacia Pedagogia Revuo) |
| **80500** | Ediční fond Anny Milatové |

Variabilní symbol uvádějte na přední straně poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do „Zprávy pro příjemce" napište účel platby. Upozornění pro majitele účtů u jiných bank! Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvádějte nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK PŘÍBRAM nebo PROCHÁZKA OLOMOUC apod. Zároveň uveďte i variabilní symbol. Dojde-li platba s označením „ČESKÝ ESPERANTSKÝ SVAZ", pak vůbec nevíme, kdo a proč platí. Takové úhrady účtujeme jako dary svazu.


**ISSN 1212-009X**






# Pordego al Kongreso

N-roj 1-6 — **De la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1999**

**Bonvenon en Berlino!** alparolis nin la kongresa kuriero, el kiu ni klopodos prezenti la plej interesajn informojn kaj dokumentojn. Post la solena inaŭguro kun salutoj de ĉiuj landaj asocioj startis riĉaj kongresaj programoj en 19 salonoj (nomitaj laŭ gravaj esperantistoj Borel, Bormann, Dieterle, Einstein, Forge, Graetz, Hodler, Hoekstra, Kalocsay, Kühlmann, Lapenna, Manson, Meiners, Schulze, Söderberg, Tautorat, Trompeter, Wüster, Zamenhof). En la kongresa palaco kun multaj eskalatoroj, interne iom simila al la Praga, sed de ekstere pli al metalurgia fabriko pro metalaj muroj kun reto da tuboj, ekssvarmis 2700 esperantistoj el la tuta mondo, rapidante jen al la libroservo, jen al prelegoj en unuopaj salonoj, jen al teatrajo aŭ koncerto.

## KONGRESAJ MESAĜOJ

### ĜENERALA SEKRETARIO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ

Kun plezuro mi sendas bondezirojn al la 84-a Universala Kongreso de Esperanto. Vi kunvenas je la fino de tumulta jarcento, kiu atestis je la pintoj kaj la abismoj de la homaj kapabloj. Multaj mondaj evoluoj rajtas ankoraŭ nin dubigi kaj maltrankviligi. En unu regiono disvastiĝas paco, en alia ekfuriozas genocido. Sen-egala lukso apudas teruran malriĉon - la staton, en kiu restas kaptita kvarono de la monda loĝantaro. Tutmondigo nin enretigas ĉiam pli dense, dum maltolero nin plu disigas. Ĉiu progreso estas necerta; la defioj, kiujn ni frontas, fariĝas ĉiam pli kompleksaj.

Hodiaŭ la monda tagordo postulas de la ŝtatoj novajn ideojn, novajn rimedojn, novajn politikajn engaĝojn. Pli kaj pli ofte montriĝas, ke la problemoj komunas. Inter la minacoj troviĝas kelkaj bone videblaj: terorismo, tutmondaj epidemioj, amasarmado. Aliaj insidas kaŝe: klimata ŝanĝo, narkot-komerco, la "lavado" de ŝtelita mono. Ĉiuj ignoras landlimojn; ili estas "problemoj sen pasportoj". Neniu lando sola kapablas ilin forbari. Tial ĉiu lando bezonas Unuiĝintajn Naciojn.

En tia ĉiam pli interplektita mondo, konstrui la pacon - kaj batali kontraŭ minacoj al la paco - postulas la partoprenon de ĉiu civitano kaj ĉiu lando. Diversmaniere kontribuas al tio la registaroj, ne-registaraj organizoj, komercaj entreprenoj, akademiaj institucioj, sindikatoj, virinaj asocioj kaj multaj aliaj. En la lastaj jaroj, tiaj diversaj fortoj de la civila socio - la socio, en kiu neniu rajtas sola kaj senkontrole decidi pri komunaj aferoj - montris sin ĉiam pli

aktivaj je la nacia kaj internacia skaloj. Tio estas tre pozitiva evoluo, ĉar ĝi helpas respondeciĝi la registarojn kaj instigas homojn al kundecidado pri temoj, kiuj rekte tuŝas iliajn vivojn.

Ĉe Unuiĝintaj Nacioj, ĉiuj ĉi kunrolantoj povas kuniĝi en komuna klopodo: por ekologia sekureco, por homaj rajtoj, por justeco, kaj tiel plu. UN daŭre prezentas malfermitan pordon al vivinda estonteco, praktikan forumon por la efika kunsolvado de mondaj problemoj, surbaze de la universalaj idealoj listigitaj en la Ĉarto. Kiel instruas afrika proverbo: "La Teron ni ne posedas, sed prizorgas por la posteuloj". Je ĉi tiu historia momento, plena de esperigaj ebloj, mi dediĉis min al la konstruado de nova fundamento el paco, progreso kaj evoluo, en la kadro kaj per la helpo de Unuiĝintaj Nacioj. Tian devon, al la nuntempo kaj la estonto, nun frontas ni ĉiuj. En tiu spirito, mi deziras al vi plenan sukceson.

*Kofi Annan*

## ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO

Kun granda plezuro mi sendas bondezirojn al la partoprenantoj en la 84-a Universala Kongreso de Esperanto. Via kongreso pritraktos la problemojn de tutmondiĝo, paco kaj lingva diverseco. Tiuj temoj ja centre rolas en la programo de Unesko, kaj ne eblas trotaksi ilian gravecon en la ĉiutaga vivo de homoj tra la tuta mondo.

Starigante la demandon "Tutmondiĝo: ŝancoj por paco?", via kongreso enfokusigas du aktualajn aspektojn de la homa kunpensado kaj kunagado. Unue, temas pri la eterna problemo de ĉiuj civilizacioj - kiel certigi la pacon; due, temas pri reganta socia evoluo fine de la 20-a jarcento, nome tutmondiĝo. Pro tio, ke paco, evoluo kaj demokratio formas nedisigeblan triangulon, necesas konsideri, kiel demokratio rilatas al tutmondiĝo, kaj kiel tutmondiĝo influas la socian evoluon ĝenerale kaj precipe la kulturan evoluon.

Kiel sian mision Unesko alprenis la celon "konstrui la defendojn de la paco" en la mensoj de ĉiuj homoj. Ĝuste tial nia Organizo direktas sian agadon al la konstruado de kulturo de la paco. Tiucele ni fondis la projekton LINGUAPAX, kun la devizo "Paco per la lingvoj". Per plurlingva edukado kaj la subteno de lingva kaj kultura diverseco ĝi celas fortigi la kredon kaj volon je paco inter la lernantoj.

Interparolante, homoj lernas kompreni unu la alian kaj praktiki la moralan solidarecon, sur kiu baziĝas ĉiu vera integriĝo. En tia aliro efektive kuniĝas la idealoj de D-ro Esperanto kaj tiuj de Unesko. Ni dividas vizion pri vera tutmondeco, preter la tre limigita tutmondiĝo ekonomia de la merkatoj. Niajn esperojn pri la estiĝo de tutmonda homa komunumo ni bazas sur la plej altaj valoroj de la homa kulturo, tiu transcenda elmontro de la homa spirito. Pro tio, ke kulturon oni esprimas unuavice lingve, interkompreniĝo per la reciproka studado de lingvoj daŭre konsidereblas kiel unu el la plej bonaj rimedoj por kunkonstrui kulturon de la paco.

Ni renovigu niajn strebojn por certigi, ke la tutmondiĝo inkluzivu ankaŭ tiun ĉi dimension: senkondiĉan respekton al kultura kaj lingva diverseco. Se ni sukcesos ĉi-rilate, tio siavice naskos novajn ŝancojn por plifortigi la pacon kaj plibonigi homajn vivojn.

Mi deziras al vi sukceson en ĉi tiu lasta kongreso de la jarcento kaj atendas kun intereso la raporton pri viaj diskutoj.

*Federico Mayor*





## D-RO L.C. ZALESKI-ZAMENHOF

Bonvolu akcepti miajn tradiciajn, sincerajn salutojn al vi ĉiuj, kunvenintaj por kongresi en Berlino, urbo, kies ĉiu ŝtono ŝajnas grave ŝarĝita de historio; urbo, kie oni iam ordonis ke Esperanto malaperu, sed urbo, kiu fariĝis por la semajno venonta la ĉefurbo de Esperantujo; urbo, de kie oni iam estris la holokaŭston de hebreoj, sed urbo, kiu post kelkaj tagoj simbole transdonos la verdan standardon al la amikoj en Tel-Avivo.

Vi kunvenis por debati pri signifoplena temo, elektita por via Kongreso: pri la Tutmondiĝo kaj pri Ŝancoj por Paco. Temo perfekte adekvata al la loko de la venontaj debatoj kaj al la komunumo debatonta:

- komunumo de Pacaj Batalantoj, kiuj kolektiĝas esperante detrui murojn de miljaroj, starantaj inter la popoloj;
- urbo, kie falis la muro popolon dividinta, eĥo de tiu evento soninta tra la mondo kaj inaŭgurinta falon de muro virtuala, dividinta la homaron en kampoj malamikaj.

Ĉi tie do, fare de dissalto de la Berlina muro, startis la efektivigado de la ideo de Tutmondiĝo, ideo konkretiganta la sonĝon pri Granda Rondo Familia de Popoloj, kantatan en nia himno La Espero.

Okazis hazarde, ke antaŭ dek jaroj, ĝuste kiam la unuaj truoj aperadis en la muro de la honto, mi troviĝis en Berlino, ankaŭ por aferoj de Esperanto, invitite de Helmar Frank al AIS-kunveno ĉi tie. Mi tiam travivis vere solenan momenton. En la etoso ĝenerala, ene de la aro de entuziasmuloj, mi frapadis per marteleto, ie trovita, kontraŭ la muro, konvinkita kontribui tiamaniere al la 'dissalto de obstinaj baroj...' Observante la falon de la muro mi havis la impreson esti vida atestanto de la fino de epoko kaj de la naskiĝo de nova, pli feliĉa jarcento alproksimiĝanta, kvankam la vorto 'tutmondiĝo' ne loĝis ankoraŭ en mia cerbo.

Tamen mi baldaŭ komprenis, ke la gravaj problemoj, kiuj ekaperas, aŭ reaperas, en tiu feliĉa estonto, fariĝinta seniluziiga nuntempo, postulas tutmondskalajn solvojn. Ĉu tiaj solvoj, ĉu la *tutmondiĝo* estas *ŝanco por paco*? Mia respondo estus: NE - ĝi ne estas ŝanco por paco, ĝi prezentas al paco KONDIĈON NECESAN!

Ĉar se hodiaŭ ne plu ekzistas muro inter iama Oriento komunista kaj Okcidento kapitalista, tamen limo ekzistas inter Nordo riĉa kaj Sudo malsatanta. Do la dissalto de tiu baro ene de mondskale organizota ekonomia ekvilibro estas kondiĉo de paco, ĉar daŭra paco ne estas antaŭvidebla inter satulo kaj malsatulo. Tiel etnaj konfliktoj, kiel religiaj, bezonas solvon pere de mondskala organizo. Kaj la senlaboreco en nia kontintento, samtempa al grava manko de laborenergio por protekti landojn kontraŭ naturaj katastrofoj aliloke; ĉu tio ne bezonas mondskalajn solvojn? Same kiel protektado de la kulturaj diversecoj, protektado de lingvoj, eĉ tiuj parolataj de etaj grupoj, vehikloj de tia diverseco, lingvoj, al kies konservado la neŭtrala lingvo internacia devas kontribui. Kaj fine, sed eble plej grave, la protekto de nia medio, kondiĉo necesa al la daŭrigo de ekzisto de nia mondo, certe ja bezonas tutmondskalan disciplinon!

En la nomo de la familio Zamenhof kaj ankaŭ en la nomo de la Fondumo Zamenhof, kreita dum la lasta jardeko en la naskiĝurbo de mia avo, Bjalistoko, mi deziras plenan sukceson al la 84-a Universala Kongreso de Esperanto. Esperanto, vehiklo de la universala TOLEREMO,

fundamenta valoro de interhomaj rilatoj, TOLEREMO signifanta respekton de la diverseco, de la alieco, tial do necesa faktoro de sukcesa funkciado de la TUTMONDIĜO.

*L.C. Zaleski-Zamenhof*

## INVITO DE LA AMBASADORO DE ISRAELO




Mi salutas vin en la nomo de la juna ŝtato, kiu antaŭ nelonge renovigis sian antikvan lingvon, tial mi estas impresita esti inter vi. En la historio multaj fortaj nacioj klopodis entrudi sian lingvon. Mia revo estas, ke en la estonteco la tuta junularo lernos el la samaj internaciaj lernolibroj - eble en via lingvo. **Mi kore invitas vin al la venontjara kongreso en Tel-Aviv.**

***(Rim. de la redaktoro:** Tiu ĉi alparolo okazis dum la sabata ferma soleno en hebrea lingvo kun interpretado. Mi do transdonas nur kelkajn ideojn laŭ miaj notoj. Sole la lastan frazon lia Ekscelenco diris en Esperanto.)*

## REZOLUCIO DE LA 84-A UK

**Kunvenanta** en Berlino, Germanujo, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1999, kun 2712 partoprenantoj el 65 landoj;

**Debatinte** pri la temo "Tutmondiĝo - ŝancoj por paco?";

**Konstatinte**, ke la celo de la Internacia Lingvo Esperanto ekde la plej fruaj tempoj estas liveri al la mondo egalecan formon de komunikado, kiu konservas la etnajn lingvojn por ties utiligo interne de la diversaj regionoj, nacioj kaj etnoj, kaj per tio certigas eblon de egaleca partopreno por ĉiuj popoloj en la tutmondiĝa procezo, kaj samtempe ŝirmas la kulturan multkolorecon de nia terglobo;

**Analizinte** la aktualan, ĉiam pli rapidan disvolviĝon de la tutmondiĝo, kiu tamen realiĝas laŭ modelo, kiu kuntrenas la elĉerpon de la naturaj rimedoj de nia planedo, tio estas de nia heredaĵo al la postaj generacioj, kaj kiu alprenas en multaj rilatoj la formon de super-regado fare de la plej prosperaj landoj de la mondo, kaj sekve elvokas la fortiĝon de naciismo kaj apartiĝemo multloke, kio siavice endanĝerigas pacon;

**Notinte**

- ke la intenacia komunumo komencis alfronti tiun problemaron ekzemple per la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj en Rio-de-Ĵanejro en 1992, en kiu partoprenis la Esperanto-movado, - ke Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj la aliaj instancoj de Unuiĝintaj Nacioj devas pluhavi centran rolon en la komuna klopodo por ekologia sekureco, homaj rajtoj kaj justeco en la mondo;

**Alvokas**

- al Unuiĝintaj Nacioj, al ties instancoj, al ĉiuj internaciaj forumoj, al la ne-registaraj organizaĵoj kaj al la uzantoj kaj parolantoj de Esperanto tra la mondo, doni gravan atenton al tiuj ĉi aspektoj de tutmondiĝo, kaj klopodi direkti la procezon tiel, ke ĉiuj homoj de la terglobo profitu el ĝi. Tio povas okazi nur ĉe senkondiĉa respekto de ĉiuj homaj rajtoj, inkluzive de la rajtoj je lingva kaj kultura diverseco;
- al la ekonomie prosperaj kaj politike fortaj ŝtatoj celi ne asimilon de la cetera mondo, sed unuiĝon kun ĝi surbaze de reciproka kompreno,

respekto kaj reciprokaj avantaĝoj, ĉar nur tia tutmondiĝo povas garantii por la homaro solidan pacon en vera feliĉo.



# EL LA KONGRESA PROGRAMO

**Aŭtoraj duonhoroj** okazadis dufoje tage en libroservo, kie la aŭtoroj prezentis siajn verkojn. Lunde Malcolm Jones kaj Erich Dieter Krause (Granda Vortaro Esperanta-Germana), marde Anna Löwenstein (historia romano "La ŝtona urbo" - plej furora libro de UK) kaj Georgo Handzlik, ĵaŭde Manuel de Seabra kaj Ronald Gates, vendrede Roman Dobrzyński kaj Geraldo Mattos.

**Kulturaj programoj**: dum la inaŭguro kaj post ĝi prezentis la dancgrupo Diverseco de bahaaj gejunuloj (14-20-jaraj) sian dancprogramon. Ni ĝuis koncertojn de pianisto Aldo Fiorentin, akordeonisto Aleksandr Danko, kantistoj Ĵomart kaj Nataŝa, Helena Puhova kaj Galina Staneŝnikova. Plej grandan intereson vekis teatraĵoj *Planto en la genuo* de la zagreba grupo de junaj geaktoroj kaj *La eta princo* en prezento de du zagrebaj geviroj kaj unu marioneto.

**Nitobe-seminario** ekde UK Prago '96 okazas dum UK por neesperantistaj fakuloj, kutime anglalingve, pri interlingvistikaj temoj. En Berlino: *La plej gravaj lingvoj en Eŭropo kaj Eŭropa Unio* (Prof. Dr. Ulrich Ammon), *Kiel novaj evoluoj en lingvaj rajtoj povas stimuli la lingvodiversecon* (Dr. Tove Skutnabb-Kangas), *Psikologiaj aspektoj de la lingvoproblemo* (Prof. Claude Piron), *La lingvoproblemo en Japanio kaj Azio* (Prof. Dr. Florian Coulmas), *La lingva problemo kaj la konsumanto* (Mrs. Emma Bonino).

**Internacia Kongresa Universitato** prezentas male fakajn prelegojn en Esperanto: *Sekureco en komputila komunikado - legitimado kaj ĉifrado* (Reinhard Fössmeier), *Psikiatrio - sojle al la tria jarmilo* (Hans Eichhorn), *Teodoro Ŝvarc, entreprenanto, verkanto, travivanto* (Humprey Tonkin), *Romantikaj poetoj en kontinenta Eŭropo* (Marjorie Boulton), *Normlingvo kaj dialekto* (Martin Haase), *PChR-Polimerazo-ĉenreakcio - revolucia diagnozometodo de AIDS-o. Apliko en Bulgario* (Eva Bojaĝijeva), *De la homarana helpo al la homarana interveno en la aktuala internacia juro* (Maria Rafaela Urueña de Hernández), *Okcidenta matematiko - sekreta batalilo de kultura imperiismo* (Alan J. Bishop).

**Libroj: furioza sukceso**

1726 titoloj, el kiuj 650 forte rabatitaj, atendis en la libroservo de UEA en salono Kalocsay. Jam la duan tagon de la kongresa semajno elĉerpiĝis en la libroservo la novaj verkoj "Esperanto sen mitoj" de Marcus Sikosek kaj "La ŝtona urbo" de Anna Löwenstein, romano pri sklavino el tempo de Nerono, verkita angle kaj esperantigita de la aŭtorino mem. Gravaj novaĵoj estis la kompleta traduko de *Faŭsto* omaĝe al 250-a datreveno de Goethe kaj Granda Esperanta-Germana Vortaro de E. D. Krause. Interesaĵo estis ankaŭ la unua traduko de Karl May (Liberigo).




**La tago de lernejo**

Marde ĉeestis pli ol cent interesatoj por aŭskulti la prezidanton de ILEI, Mauro La Torre, kiu enkondukis en la temon "Ĉu tutmondiĝo ankaŭ de edukado aŭ ĉu riĉiĝi per diverseco". Sekve Günther Lobin priskribis la eduksistemon en Germanio. Estis prezentataj instruiloj de ILEI antaŭ ol dediĉi pli ol unu horon al vigla diskutado pri kulturdiverseco en lernolibroj kaj en la komenciĝanta ILEI-projekto Interkultura Edukado ĉe "kvazaŭ-lernejo" en interreto.

## Hej, ĉu vi parolas Esperanton en via familio?

Tia estis demando de ĵurnalisto dum la gazetara konferenco, okazinta la 29-an de julio en la urbodomo de Berlino, organizita de Germana Esperanto-Asocio. Frank Stocker, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, Marko Naoki Lins, prezidanto de Germana Esperanto-Junularo, Fritz Wollenberg, LKK-ano kaj prezidanto de E-Ligo Berlino, kaj Kokou Sagbadjelou, prezidanto de Unuiĝo Togolanda por Esperanto, prezentis al 25 ĵurnalistoj, venintaj de radio-, televid- kaj printkomunikiloj, Esperanton ĝenerale, la kongreson kaj ĝian programon, la praktikajn uzeblecojn, la aktivaĵojn en Berlino kaj en Togolando. Al la supre menciita demando s-ro Sagbadjelou povis verve respondi jese. Alia ofte starigita demando kompreneble estis la "konkurenca" rolo de la angla kiel universala lingvo.

Post la konferenco en tre agrabla etoso eblis - enmane sandviĉoj, kafo kaj mikrofono - respondi dum interpersonaj intervjuetoj pli profunde al gazetaraj demandoj.

La gazetara konferenco estis tamen nur kulmina okazaĵo de plurmonata publikrilata laboro flanke de GEA kaj de berlinaj esperantistoj. Jam ekde aprilo GEA informis la gazetaron per diversaj novaĵoj. Sekve en kvazaŭ ĉiuj berlinaj gazetoj aperis jam tre pozitivaj artikoloj kaj ankaŭ en multaj tutgermanaj ĵurnaloj aperis jam artikoloj, kiel ekzemple en la tre renoma germana politikĵurnalo DER SPIEGEL. Plie GEA centre organizis specialan gazetaran servon: Ĝi dissendis individuan informon al ĉiuj gazetoj en Germanio, el kies regiono venos esperantistoj al Berlino. Estis entute ĉirkaŭ 200 diversaj informoj kaj la reeho estis bonega. Al la solena inaŭguro anonciĝis ankaŭ la unua germana televidkanalo ARD.

## Porokaza poŝtstampo

La Germana Poŝto eldonis porokazan poŝtstampon.

**Subskribu!** La plej granda poŝtkarto de la mondo, kreita dum UK 1998, en Montpeliero, alvenis al Berlino, por ke ankaŭ partoprenantoj de la UK 1999 subskribu ĝin. Poste ĝi revenos al Francio por esti donacita al la Prezidanto de la Eŭropa Parlamento kiel pruvo, ke Esperanto vigle vivas.

**Ekspozicio: Modelo por la Homara Unuiĝo** prezentis la internacian bahaan komunumon kiel unikan modelon de vere tutmonda kaj ege diverseca komunumo. Videblis ampleksa serio da fotoj pri bahaanoj kaj iliaj aktivecoj ĉirkaŭ la mondo.

## Bicikle el Ĉeĥio



La instruisto por gimnastiko kaj geografio Oldřich Schwetter forveturis la 28-an de junio el Havířov proksime de Ostrava kaj biciklis 1146 kilometrojn ĝis Berlino, survoje vizitinte esperantistajn kaj aliajn geamikojn.

## Kalendaro 2000 - niaj infanoj

Bela bildkalendaro, eldonita de la E-klubo de Lund, Svedio por apogi la agadon de Pacamanta Esperanto-Rondo en Mwanza, Tanzanio kaj aparte por helpi financigi la diskonigon kaj disvastigon de sunenergiaj kuiriloj tie kaj ankaŭ en aliaj afrikaj landoj.

**"Faru-mem"-kalendaro.** Jen donaco por viaj amikoj: En la UK-librovendejo estis antaŭmendeblaj kalendaroj por memkompletigo. Elektu la bildojn, fotojn, poŝtkartojn ktp. kaj metu ilin en la kadrojn.





## 65-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

La kongreso okazis en Berlino de la 25-a ĝis la 31-a de julio 1999. Partoprenis 102 vidhandikapitoj kaj akompanantoj el 18 landoj en 4 kontinentoj. Unuafoje ĉeestis afrika blindulo Lazare Hounake el Lomé, Togolando, kiu tute sola sukcesis alveni. Amerikon reprezentis Jean Sorel (Kanado), Azion - Natalija Kasymova (Taĝikio).

La kongresa temo "Esperanto kaj kulturo" inspiris i. a. altnivelajn prelegojn de LKK-prezidanto Theodor Speckmann pri Goethe kaj Fontane, de Nadja Ĵukova pri Puŝkin kaj de Otto Prytz pri la norvega aŭtoro Falkberget; krome muzikon de krimea blindulgrupo.

Riĉa ekskursa programo vidigis Berlinon, Potsdam (kastelon "Sanssouci" kun unika ŝanco mane vidi objektojn) kaj - kvietige - Spree-arbaron. Pli fakaj temoj rilatis la kulturan servon de la Finna Blindulligo (Raimo Tanskanen) kaj la influon de la sociala kaso de Eŭropa Unio al dungado de blinduloj (Arvo Karvinen).

Resume: ĝi estis unu el la plej sukcesaj blindulkongresoj de la jarmilo.

La venontan kongreson organizos verŝajne bulgaraj membroj en Plovdiv (por la jaro 2000).

*(Rob Moerbeck, Jan Bemelmans)*

## Radio ĝenerale

Tutaparte por Esperanto en radio 1999 estas jaro de la interreto. Ja pli kaj pli da esperantlingvaj radioprogramoj estas aŭdeblaj tra la Tut-Tera Teksaĵo (pere de teknologio Real). Temas ne nur pri internaciaj ŝtataj stacioj (Varsovio, Tallinn, Vieno kaj Vatikano) sed ankaŭ pri lokaj iniciatoj: jen de Västerås (kiu antaŭe elsendis nur loke per FM kaj nun akiris mondskalan aŭskultantaron), jen de ekaperantaj stacioj, kiuj elsendas nur interrete: Retradio el Koreio kaj Radio Saluton. Detaloj kaj ligoj ĉe la TTT-ejo de Esperanto en Radio: http://osiek.org/aera aŭ surpapere.

*Bruno Masala*

## EU-parlamentano pledas por Esperanto

Dum la inaŭguro de la UK parolis D-ro Christoph Tannert, ano de la Eŭropa Parlamento kaj membro de la honora komitato de la UK. Li interalie diris jenon (elĉerpaĵoj tradukitaj el la manuskrito): "La Eŭropa Unio aktuale havas 15 membroŝtatojn kun 11 oficialaj lingvoj. Tiom same da oficialaj lingvoj havas la Eŭropa Parlamento, kaj kun la venontaj pliampleksigoj fariĝus 10 pli, se oni restus ĉe tiu principo. Tio ne eblas. Ĉiukaze estas maljusta principo, ĉar en multaj membroŝtatoj ekzistas pli ol unu lingvo. Solvo nur povas esti uzo de dua lingvo komuna por ĉiuj. En la institucioj de la EU la angla jam estas fakte la komunikada lingvo. Sed estas tre simpla angla, kaj kiel ĉiuj etnaj lingvoj ankaŭ la angla ne estas neŭtrala politike kaj kulture. Do oni konsideru konstruitan lingvon kiel Esperanto. 128 anoj de la Eŭropa Parlamento (pli ol 20%) subtenis iniciaton, kiu postulas Esperanton kiel devigan lernejan fakon. Intertempe mi ankaŭ aliĝis al ĝi. Mi fine citas la filozofinon Hannah Ahrendt: 'La unuiĝo de la homaro kaj ĝia solidareco ne povas konsisti el tutmonda kontrakto pri unu religio, unu filozofio, aŭ unu registara formo, sed nur el la fido, ke la diverseco montras al la unueco, kiu per la malsamoj samtempe estas kaŝata kaj malkaŝata'. Por tia unueco komuna komunikada lingvo estus plej bona kondiĉo, nome por vivoplena multeco de lingvoj".

# Raportoj pri fakaj asocioj

**Poŝtistoj.** Dum la ĉefkunveno de IPTEA prezidanto Veikko Mäki-Luopa el Finnlando raportis, ke en lia hejmlando ekzistas plej multegaj radio-telefonoj kompare kun la loĝantaro, nome 60%.
**Monda Turismo.** 50 personoj ĉeestis la kunvenon kaj aŭdis pri la bona evoluo de la Internacia Asocio "Monda Turismo", kiu agas mondskale. Ĉimonate okazas vojaĝo al la 2-a Azia Esperanto-Kongreso en Hanojo. La kunveno instigas al LKK-oj ebligi malaltkostan loĝadon por homoj el malriĉaj landoj.
**Kosmologio de Martinus.** S. F. Jorgensen laŭdas la kunvenojn de Martinus-Instituto pri reenkarniĝo kaj karmo: "La prelego donis inspiron por fariĝi pli bona homo."
**Verduloj.** Asocio de Verdulaj Esperantistoj informas pri kontaktoj al Verdaj Eŭropa-Parlamentoj. La franca partio Les Verts subtenas proponon studi kian rolon esperanto povus ludi inter Verdulaj partioj.
**Vegetaranoj.** Por la unua fojo okazis kurso de Esperanto laŭ Ĉe-metodo kaj Mazidum la "The 7th European Vegetarian Union Congress" en de la 18-a ĝis 23-a de julio. La lingvoj de la kongreso estis la angla kaj la germana. Inter la 300 kongresanoj estis 20 lernantoj de diversaj landoj, kaj pluraj daŭrigas la lernadon.
**Eŭropa E-Unio.** Marde okazigis sian duan fermitan kunsidon. Tie elektiĝis la nova "trojko" kaj decidiĝis la EUU-membrokotizoj ankaŭ por la jaro 2000. La trojko konsistas el prezidanto Umberto Broccatelli (Italio), kasisto Hans ten Hagen (Nederlando), sekretario Katinjo Fetes-Tösegi (Aŭstrio).
**Litova Stelo.** Legantoj kaj legontoj de Litova Stelo ĉe kunveno eldiris kontenton pri enhavo, lingvaĵo kaj aspekto. La redaktoro P. Ĉeliauskas invitis ne nur aboni ĝin (eblas dum la UK ĉe la giĉeto de Litova Stelo), sed ankaŭ kontribui materialon.
**Nefumantoj:** 33 personoj el 12 landoj ĉeestis la kunvenon de nefumantoj TADEN. TADEN fondiĝis en 1995/96 kun la celo preventi fumĝenon al aliaj. Oni informis ekz. pri protestoj de la nederlandaj aktivaj nefumantoj kontraŭ publika fumado en TV-forumo kaj pri malpermeso de tabakreklamoj en Eŭropa Unio ekde 2006. Finno konstatis, ke ofte homoj fumas en zonoj de malpermeso, ankaŭ ĉi-kongreseje.
**IKUE-renkontiĝo:** Membroj de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) kaj multaj gefratoj kuniĝis plensalone; P. A. Kronenberger invitis raportojn pri agadoj, kaj oni do informis ekz. pri la medalo de toleremo (fare de Societo Zamenhof) al papo Johano Paŭlo 2-a, la nuna "ĉielarka nacio" en Sud-Afriko kaj multaj aliaj aferoj. La kunveno bone preparis la kunlaboron en Gliwice dum la venonta Ekumena Kongreso.
**Rondo Kato:** 55 katamikoj kunvenis kaj decidis pri estrara kaj kasa raportoj, diskutis pri individua kunlaboro de E-katamikoj, pri agado de unuopaj katamikoj en bestoprotekta laboro. En Germanio fondiĝis antaŭ tri jaroj katrondo de reciproka helpo. Rondo Kato havas amikojn en pli ol 35 landoj de ĉiuj kontinentoj.
**FAME-fondaĵo** elektis novan estraron. Prezidanto - anstataŭ Stefan Maul - nun estas D-ro Werner Bormann, estraranoj D-ro Till Dahlenburg kaj Utho Meier.
**"Internacia Preĝhoro":** Lundon la 2-an de aŭgusto kunvenis ĉ. 70 homoj el plej diversaj devenoj religiaj kaj naciaj. En la preĝejo "Am Lietzensee" por komune partopreni "Inter-religian Preĝ-horon" organizitan de BEL (Bahaa Esperanto-Ligo) kune kun WCRP-Berlino (World Conference on





Religion and Peace). En fratece spirita etoso eksonis sanktaj vortoj el la Biblio, el Korano, el Bagaupo-Cito, el budhisma Sutro, ankaŭ el Bahaa Preĝo de la Unueco, kaj speciala Tanka-o de OOMOTO pri Esperanto. Post komuna kanto fina en germana kaj Esperanta lingvoj, ĉiuj povis ĝui amikecan interparoladon ĉe malgranda bufedo.
**Verkistoj:** Esperantlingva Verkista Asocio EVA havis sian jarkunvenon kun ĉ. 20 partoprenantoj, inter ili pluraj verkistoj, sub gvido de Gerrit Berveling. Estis akceptitaj novaj membroj: Tomasz Chmielik (Pollando), Anna Löwenstein (Britio / Italio), Dao Anh Kha (Vjetnamio) kaj Gunnar Gälmo (Svedio). La Sveda Akademio konfirmis al EVA la ricevon de la dokumentoj pri kandidatiĝo de William Auld por la Nobelpremio pri literaturo por la jaro 1999. Estis lanĉitaj pluraj projektoj, interalie pri alvoko al legantoj de kelkaj literaturaj gazetoj elekti 25 plej ŝatatajn aŭtorojn / verkojn en Esperanto. Oni esploros pri ebleco filmi intervjuojn kun verkistoj por starigi arkivon de vidbenda materialo pri Esperantaj aŭtoroj. (S. Štimec)
**Deklaracio pri Etnista Humanismo.** La kunveno de IKEL je dimanĉo aprobis la Deklaracion por Etnista Humanismo. Laŭ tiu deklaracio la nuna monda situacio estas plurflanke kritikinda, pro tutmondiĝo, kiu okazas en la plej malbona maniero prioritatigante la interesojn de ekonomiaj potencelitoj anstataŭ klopodi solvi mondskale la problemojn de malriĉeco, malsatado, nejusteco. Eĉ, tiuj grupoj ekspluatas la ekziston de etnaj konfliktoj por akapari al si la disponeblajn rimedojn kaj akiri kontrolon super neleĝaj negocoj kiel vendado de armiloj kaj drogoj. El tio venas ne plu tolerebla ekspluatado de la naturo, kiu kaŭzas katastrofojn kiel la forcejan efekton, kaj militoj, kies superstrukturo estas etna, sed kies efektiva kialo estas ekonomiaj interesoj.
La IKEL-membroj do intencas direkti sian agadon al pli justa distribuo kaj uzo de naturaj rimedoj, kiu evitu ekspluatadon super indiĝenaj popoloj kaj ekologiajn katastrofojn.
**Esperantlingva kafejo.** Bela kafejo "Verda Dorno" kun trankvila ĝardeno kaj tre malaltaj prezoj invitas al kafo, teo, kuko, biero, suko aŭ alia. Ĝi troviĝas je kvaronhora pieda distanco de la kongresejo proksimume de S-haltejo "Raußendorfplatz". Funkciis dum UK.
**Fervojistoj.** Kunvenis 76 gekolegoj el 17 landoj. Inĝ. István Gulyás prezidis kaj raportis pri la okazinta 52-a IFEF-kongreso en Le Mans (Francio). Estis prelego pri la venontjara "EXPO 2000" okazonta en Hannover, Germanio, inkluzive pri la rolo de la fervoja trafiko. Fakekskurso kondukis al granda fervojo-konstruejo en la mezo de Berlino.
**Kulturaj ĉefurboj.** En la jaro 2000 naŭ urboj estos kulturaj ĉefurboj de Eŭropo: Bologna (IT), Bruxelles (BE), Praha (CZ), Helsinki (FI), Kraków (PL), Avignon (FR), Bergen (NO), Rejkjavik (IS), Santiago de Compostela (ES). Antaŭ pli ol 100 partoprenantoj oni raportis pri la agado rilate tiun temon kaj pri la ĝisnunaj kontaktoj kun la oficialaj organizo-komitatoj. Post la kunveno la esperantistoj el la koncernaj urboj organizis apartan renkontiĝon por pli bone kunordigi la landajn iniciatojn.
**Urso-kurso.** Surprizo estus milda adjektivo por priskribi, kiel ravita mi fariĝis, kiam mi ĉeestis prezentaĵon de Malcolm Jones pri kurso por infanoj (6- ĝis 10-jaraĝaj). La instrumaterialoj faritaj kun granda dediĉo konsistas el lernolibroj, instrugvidiloj, kvizoj, ludiloj, premioj k.a.

**UEA-komisiono por Ameriko.** Ĝi informis pri sia agado en kunsido, kiun ĉeestis 122 personoj. Unu el la eroj estas la revivigo de la serio de amerikaj kongresoj; ĉi-jare ĝi okazis en Bogotá. Estis lanĉita la numero 2 de la bulteno "Aktiv-Ameriko", kiu legeblas ankaŭ ĉe http://www.digicron.com/ameriko. Vizitintoj de Sudameriko el Germanio kaj Francio raportis pri siaj vizitoj. Bill Maxey informis pri siaj instruvojaĝoj. Oni emfazis la gravecon de streboj krei kaj fortigi la kontaktojn kun la najbaraj landaj asocioj. Fine de la kunsido la ĉeestantoj malavare donacis monon por la sendado de vortaroj al Kubo.

**Komercistoj.** Multaj membroj kaj gastoj partoprenis la jarkunvenon de IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo). Prezidanto Franz Braun prezentis raporton pri 1998. En la 15-a jaro de la fakgrupo la membraro kreskis. Finance IKEF estas stabila. Ĝi fruktodone kunlaboras kun parenca grupo TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj). Tiucele okazis ankaŭ komuna kunveno. Multaj reklamanoncoj popularigis diversajn kompaniojn en E-movado, kio havigis maklerajôjn al la kaso. La agadplano por 1998 - 2000 havas tre gravajn taskojn, el kiuj la membroj (kies duono estas interretanoj) povas selekti laŭvole, kaj ĉiuj povas kontribui al realigo. IKEF havas hejmpaĝon. Oni diskutis la terminaran laboron kaj novaj volontuloj aliĝis al la Terminara Sekcio.

**Verduloj.** Renkontiĝon de AVE (Asocio de Verduloj Esperantistaj) partoprenis preskaŭ 100 membroj kaj interesatoj. Ĉe la raporto de la sekretario menciindas, ke videblas la unuaj rezultoj je landa kaj internacia nivelo]. En la franca programo de la Verda Partio okaze de la baloto por la Eŭrop-Unia Parlamento (EP) estis publikigita propono studi la potencialon de Esperanto por la uzebleco ene de EP kaj EU. Dume por simila propono en la germana Verda Partio nur voĉdonis 25 % de la delegitoj. AVE klopodas estigi diskuton pri la lingva problemo en la Verda Grupo de EP. Similan paŝeton AVE atingis dum la 2-a Kongreso de la Federacio de Eŭropaj Verdaj Partioj fine de februaro en Parizo. Kunagadis SAT kaj junaj esperantistoj ĉe informstando.

**Aŭtomobilistoj.** Refondiĝis la faka asocio de aŭtomobilistoj kun reprezentantoj el 11 landoj. La nova nomo de la asocio estas: Aŭtoklubo Esperantista.

**Senmone:** Kunvenis SIKA (Senmonaj Interŝanĝoj kaj Alternativo) por plifirmigi sian asocion registrita. La partoprenantoj elektis novan estraron kaj raportis pri pasinta agado. Oni diskutis pri eventuala tradukteamo por diskonigi informojn pri pluraj temoj urĝaj.

**Komunistoj.** Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK) en sia kunveno diskutis pri venonta konferenco en Havano (Kubo), lecionoj el la pasinteco kaj proponoj por la estonteco.

**Ekskurso tra Berlino.** Estis interesa kaj agrabla ekskurso. La ĉiĉerono kaj la tradukanto bonege plenumis siajn taskojn.

**Ekskurso "kaŝita orienta Berlino".** La ĉiĉerono, s-ino Hella Lanka, lerte kaj klare parolis, eksplikis la interesan Esperanto-historion.

**Terminologio.** Ĉeestis la kunvenon pli ol 80 interesatoj pri terminologio. Oni aŭskultis prelegojn de Wera Blanke pri TEC (Terminologia Esperanto-Centro), de Lluis de Yzaguirza i Maura pri neŭtralaj lingviloj por la plejmultoj kaj de Christer Kiselman pri reviziado de PIV. Sekvis informoj pri konkretaj terminologiaj atingoj ĉe forstistoj kaj fervojistoj. Dum vigla diskuto klare sonis la deziro revigligi TEC-on, tamen kun ŝanĝita labormaniero.





iliajn literaturojn.

Martin Haase (Germanio) priskribis la aplikon de la germana en la reto. Ofte la buŝaj parolantoj klopodas uzi la kultivitan literaturan lingvaĵon, en la retaj diskutejoj oni male renkontas strebon imiti per skribaj rimedoj la familiarecon de neformala buŝa interparolo. Per ideogramoj, majuskloj, ripetataj kri- aŭ demandsignoj oni esprimas ridon, ploron, ekkriojn, kisojn, emfazojn, ĝemojn, oscedojn. Inter la retaj diskutantoj evoluis vico da reguloj kaj ankaŭ mallongigoj kaj ideogramoj ( :-x = kiso, ROTFL = mi ridegas, LOL = mi ludas). Kelkaj el la mallongigoj jam penetris en la normalan buŝan lingvon simile kiel la usona O.K.

Ilona Koutny (Hungario) dediĉis sian prelegon al la internacia lingvo en la interreto. Ŝi informis precipe pri Virtuala Esperanta Biblioteko, Flavaj paĝoj, Adresaro de rete atingeblaj esperantistoj, pri diskutejo Bja-listo, pri hejmaj paĝoj de E-asocioj landaj kaj fakaj, vortaroj, literaturo, instru-programoj. Samtempe ŝi atentigis pri misaj aferoj aperantaj en la reto: dissendado de nepetitaj reklamoj, kutime pri sekso, kaj malzorga stilo de retleteroj, kiu maleduke influas ĉefe infanojn. Adreso de Esperantaj TTT-paĝoj: www.esperanto.net/veb.

## Enketaj rezultoj.

Jen la unuaj tri ciferoj post trastudo de la unuaj 50 kongresaj enketiloj: meza aĝo de kongresano: 52 jaroj; meza aĝo dum unua kontakto kun Esperanto: 22 jaroj; meza aĝo dum eklerno de Esperanto: 31 jaroj. Sekve averaĝe pasas 9 jaroj inter ekkontakto kun Esperanto kaj eklerno de la lingvo.

## Savi kulturan heredaĵon

Dum 112 jaroj nia komunumo produktis amason da kulturaĵoj. Ili estas plej ofte sur detruiĝemaj materialoj. Nia tasko estas nun pripensi strategiojn por savi ilin. Alia tasko estus kompili kompletan bibliografion de Esperanto. Ni ankaŭ bezonas gvidliniojn por katalogigi la diversajn Esperanto-bibliotekojn.



## Kompakt-Disko por Afriko

Ĵus aperis kompakt-disko kun tri muzikaĵoj kun Esperanta teksto kaj du nur instrumentaj. Teksto kaj muziko de Magnus Lund, Svedio. Ĝi kostas 10 DEM - tiu mono estos uzata por la afrika agado.

## Forumo de Fakaj Asocioj

Kunvenis ĉ. 50 homoj el diversaj fakoj.

*Roland Rotsaert* (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) atentigas pri la problemoj, kiujn asocio havas por bone prezenti siajn informojn tra interreto.

*André Weber*: Sur 'Esperantaj' produktoj oni sisteme menciu interret-adreson: http://www.esperanto.org

*G. Grattapaglia*: Faka agado estu prioritata precipe, kie estas lingvaj problemoj plej gravaj (eĉ se oni ne konscias pri tio) - ekz. rotarianoj (E-grupo: RADE). Idearo de rotarianoj tre similas al esperantistoj.

*Lászlo Szilvási* (revuo Eventoj): (1) Eventoj ofertas servojn al fakaj asocioj (aperigo de informoj). (2) Budapeŝta E-domo havas (kun UEA) projekton 'savu nian kulturon' por redisponigi fakan literaturon, enkomputiligante ne plu haveblajn verkojn. Aŭtoroj sendu siajn verkojn en elektronika formo.

*Rapley* (La Kvinpetalo, La Bouresse): Fakaj asocioj sendu informojn pri si por disdono al kursanoj de Kvinpetalo.

## Ekumena Diservo

Pli ol 600 homoj partoprenis la "feston de dankemaj homoj" dimanĉe en la historie grava preĝejo "Sankt Marien". Elstaris kontribuo de ĥoro el Munkeno kun meso komponita originale en Esperanto. La Diservon gvidis pastroj el pluraj nacioj. Memorigante pri mallumaj punktoj de la milita kaj postmilita historio, predikis A. Burkhardt pri la temo elektita de Berlinanoj: malgraŭ elreviĝoj dankemo pri ĉiuj ebloj.

## Belartaj Konkursoj

Jen la rezultoj en 1999:

**Poezio: 1-a premio**: Antonio Valén (Hispanio) pro "Amafer' iama"; **2-a premio**: Stefan MacGill (Hungario) pro "Ercoj"; **3-a premio**: Gonçalo Neves (Portugalio) pro "Amoroj"; **Honoraj mencioj**: Gonçalo Neves (Portugalio) pro "Gagat'" kaj "Aglo". Partoprenis 52 verkoj de 25 aŭtoroj el 17 landoj.

**Prozo: 1-a premio**: Sten Johansson (Svedio) pro "Nepoj en Torento"; **2-a premio**: Sten Johansson (Svedio) pro "Kastelo de revoj"; **3-a premio**: Lena Karpunina (Germanio) pro "La ridinda letero"; **Honora mencio:** Jorge Camacho (Hispanio) pro "Ludwig". Partoprenis 20 verkoj de 14 aŭtoroj el 12 landoj.

**Teatraĵo: 1-a premio:** Paul Gubbins (Britio) pro "Nun ni parolu!" kaj "Kien la pruneloj kreskas"; **2-a premio:** ne aljuĝita; **3-a premio:** Paul Gubbins (Britio) pro "La forlasito". Partoprenis 5 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj.

**Eseo: Premio "Luigi Minnaja"**: Gonçalo Neves (Portugalio) pro "Niaj verboj sen veproj"; **2-a premio:** ne aljuĝita; **3-a premio:** ne aljuĝita.

**Kanto: Premio "Ahn Song-san pri Kanto"**: Valentina Maria Nan (Rumanio) pro "Ami"; **2-a premio:** Fiorello Fiorentin, teksto, kaj Aldo Fiorentin, muziko, (Italio) pro "Rifuĝintoj"; kaj Anja Karkiainen, teksto, kaj Vesa Pölkki, muziko (Finnlando) pro "Kiam la folioj flavas"; **3-a premio:** Aldo Fiorentin pro "Pensoj pri la paco". Partoprenis 10 kantoj de 6 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 6 landoj.

**Infanlibro: Premio "Infanlibro de la Jaro 1998"**: Kroatia Esperanto-Ligo pro la libro "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapic" de Ivana Brlic-Mazuranic, trad. el la kroata Maja Tišljar.

**Vidbendo: 1-a premio:** "Esperanto in Mecklenburg und Vorpommern 1905-1944" (1-a parto) de Ralf Kuse, Germanio; **2-a premio:** "Esperanto - komunikado kaj kulturo" de Brazila E-Ligo, reĝisorita de Ciro Gomes de Freitas; **3-a premio:** "Malproksima eho de la silka vojo" (pri Taĝikio) de Firdaus Ŝukurov, Taĝikio. Du vidbendoj ne videblis pro teknikaj kialoj. Sume partoprenis 5 vidbendoj.

*F. L. Veuthey*

## Homaj Rajtoj

Fama franca oceanografo, J. Y. Cousteau, antaŭ sia forpaso, lanĉis ideon pri aldono al Homaj Rajtoj: la Rajtoj de la Estontaj Generacioj ; ĉar ekde nun ni respondecas pri tio. Lia teamo kolektas subskribojn por apogi tiun agadon (ĝis nun pli ol 9 milionoj). Ili estos prezentataj ĉe Unuiĝintaj Nacioj. En via lando vi povas ankaŭ agadi, subtenigi. Pro tio, ni demandas bonvolemulojn por traduki al Esperanto, de la franca aŭ de la angla, malmultajn informojn. Aliflanke, ni demandas tradukantojn el Esperanto al gepatraj lingvoj. Informoj: S-ro René Ballaguy, 12 rue du Ct Cousteau, 95000 Francio, esperanto95@wanadoo.fr.





## 12-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco en Opava

Ekde la 24-a ĝis la 29-a julio 1999 okazis unuafoje en Ĉeĥa Respubliko sub honora protektado de la ĉefurbestro de Opava J. Mrázek la 12-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco IMEK '99. Jam longe antaŭ la konferenco LKK faris multon por atingi atenton de publiko, ĵurnalistoj kaj eventualaj sponsoroj. Tiu aktiveco estis sukcesa kaj la unuan fojon en la historio de Imekoj estis la konferenco subvenciita de kelkaj entreprenoj kaj farmaceŭtikaj firmaoj kaj estis akompanita per granda intereso de regionaj kaj tutŝtataj ĵurnaloj. La ĉefaj organizantoj de la 12-a IMEK estis UMEA, ĈEA kaj Esperanto-klubo en Opava. La konferenco okazis en Studenta hejmo de Hotela lernejo, kiu montriĝis kiel tre bona elekto pro luksa interiero, bona manĝejo, bela konferencejo kaj agrablaj ĉambroj. Solenan malfermon de la konferenco partoprenis ankaŭ ĉefurbestro de Opava kaj kelkaj ĵurnalistoj, kun kiuj oni diskutis pri historio kaj evoluo de esperanto kaj ĝia internacia signifo en la tempo, kiam la mondon invadas tajdo de la angla lingvo kaj kulturo, dum aliaj naciaj lingvoj kaj kulturoj suferas. La konferencon prezidis D-ro Imre Ferenczcy, D-ro W.Opoka, D-rino E. Kopečná kaj Dro J. Hradil. Partoprenis entute 47 medicinistoj el 12 landoj (ankaŭ el Brazilio - Prof. Soares kaj D-rino Campos, el Japanio - D-ro Harada kun edzino kaj D-ro Saionji). La ĉefa temo de la konferenco estis: "Baza sanzorgo kaj medicino de laboraj malsanoj" kaj partoprenantoj aŭskultis kaj diskutis pri 30 prelegoj el balneologio, homeoterapio, stomatologio, klinika farmakologio, psiĥiatrio, ĥirurgio, pediatrio, interna medicino kaj aliaj. Unu faka kunsido estis dediĉita al spertoj kun Yumeiho terapio kaj rezultoj en terapio de diversaj malsanoj (ekzemple kun kuracado de diabeto, multobla sklerozo, osteoporozo kaj aliaj).

Dum la konferenco okazis kursoj pri Yumeiho terapio sub gvidado de ĝia fondinto D-ro Saionji kaj kuracado de kelkaj pacientoj. Kelkaj kursanoj faris buŝan kaj praktikan ekzamenojn kaj ĉe la fino ili ricevis diplomojn, kiuj konfirmas atingitan gradon de majstreco de la metodo. La 12-an IMEK-on akompanis dank' al sponsoroj riĉa vespera programo en tipaj ĉeĥaj restoracioj kaj bierejoj. Okazis ekskursoj en distriktan psiĥiatrian malsanulejon, en banlokojn Karlova Studánka, Jeseník kaj Klimkovice. Oni komune grimpis sur la plej altan monton de Moravio Praděd. La konferencanoj estis solene akceptitaj de ĉefurbestro de Opava, kiu diris kelkajn vortojn pri historio de Opava, poste oni diskutis pri signifo kaj utileco de esperanto kaj finfine oni vizitis urbodoman turon kun bela ĉirkaŭrigardo de la urbo.

La konferenco pasis en tre sincera etoso. Ĝi plifortigis amikajn kaj profesiajn rilatojn. Oni ne sukcesis diskuti kaj trovi respondojn al ĉio, tamen la traktado estis fruktodona kaj en la tempo de komputiloj, Interneto kaj e-reta komunikado ĝi malfermis pordojn por alia komuna laboro kaj kontaktoj.

*E. Kopečná*

Al la detala raporto pri la 12-a IMEK utilas aldoni kelkajn vortojn, ĉar oni povas taksi ĝian preparon kaj publikan utiligon kiel vera modelo. Ĝia gazetara konferenco estis bone preparita kaj relative riĉe vizitita, kio rikoltigis pli ol 20 artikolojn en ĉeĥa gazetaro, kelkfoje pri la konferenco informis

loka kaj regiona radioelsendo kaj oficialan raporton eldonis ankaŭ la ĉeĥa presagentejo.



La urbestro de Opava d-ro J. Mrázek salutas la IMEK - konferencon (tradukas V. Kočvara)

La unuopajn programerojn de la konferenco, ĉu fakajn ĉu distrajn partoprenis kelkaj lokaj medicinistoj, kiuj montris viglan intereson pri eblecoj de la internacia lingvo.

Denove montriĝis, ke la internacia E-renkontiĝo, kiu celas specifan utiligon de Esperanto estas por publiko pli efika ol nura amasiĝo de esperantistoj, kiuj celas amikan kunestadon kaj praktikadon de la lingvo. Tamen, bedaŭrinde, eĉ tiun eblecon la lokaj kaj ĉirkaŭaj samideanoj ne sufiĉe eluzis, kvankam la organiza komitato invitis ilin al vizito de la konferenco sen ia severa limigo.

kov.

## La 72-a SAT-kongreso en Karlovy Vary

Jam trian fojon kongresis Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) en Ĉeĥio: en la jaro 1921 en Prago, temis ja pri la fondokongreso dum la Universala kongreso de Esperanto; en 1994 en Strážnice kaj nun inter la 24-a kaj 31-a de julio en Karlovy Vary.

Por la ĉijara SAT-kongreso aliĝis 178 esperantistoj de 27 landoj, kiuj kreis vere internacian amikan etoson.

Krom la internaj laborkunsidoj de SAT, kunveno de ties fakaj frakcioj kaj tradicia jarkunveno de TANEF (naturamikoj) dum la SAT-kongreso estis riĉaj ankaŭ kaj faka, kaj distra programoj. El la faka ni nomu almenaŭ la prelegon de multjara kaj sperta sindikata funkciulo Pavel Růžička, kiu estis prezentita en la ĉeĥa (kun traduko de L. Karešová kaj P. Chrdle), kiun sekvis riĉa diskuto. Krom tiu ununura tradukita interveno ĉiuj ceteraj jam okazis en Esperanto: S. Chrdlová (CZ) prezentis banlokan tradicion en Karlovy Vary, L. Karešová (CZ) prezentis siajn spertojn de laboro kun mense handikapitaj plenkreskuloj, I. Peyraut (FR) prezentis longan lukton de sendokumentuloj en Francio, G. R. Ledon (BR) alproksimigis al la aŭskultantoj aktualajn faktojn el ekonomikaj kaj socipolitikaj karakteroj, J.-L. Tortel en sia prelego traktis la okcitanan lingvon kaj epokon de trobadoroj en Francio, Alex Karkovsky (RU/US) rememorigis en sia kontribuo unikan blindan mondvojaĝanton, verkiston kaj instruiston V. J. Jeroŝenko, K. Enderby (AU) okupiĝis en sia prelego pri la demando, ĉu eĉ murdisto meritas ricevi justecon kaj precipe ĉu la socio povas toleri tion montrante je ekzemplo, ke tiu ŝajne simpla demando fariĝas en praktiko ege komplika. V. Hasala ne nur prelegis pri Esperanto en poŝto kaj filatelo, sed krome gvidis dum la kongreso filatelan dumkongresan giĉeton.



La prezidantaro de SAT -kongreso en K. Vary





Sed la kongreso ne konsistis nur de fakaj prelegoj. Dum la tuttaga ekskurso kelkaj vizitis Pragon, aliaj la ceterajn famajn okcidentbohemiajn banlokojn (F.Lázně kaj Mariánské Lázně) kaj la kastelon Loket, dum la tria grupo de kuraĝuloj pilgrimis al la kastelo Loket piede kaj plej bone konatiĝis kun la belega pejzaĝo. Dum duontagaj ekskursoj oni ekkonis Jáchymov (ne nur ties riĉan mezepokan historion kaj banlokan centron, sed ankaŭ la muzeon de la stalinisma koncentrejo), Klášterec nad Ohří kun ties kastelo, sed ankaŭ la plej grandan akvotoboganon en Ĉeĥio kaj nelaste la promenekskurso gvidis ilin tra la kongresurbo Karlovy Vary.

Ankaŭ la kultura programo estis bunta: la muzika vespero konsistis de du partoj: dum la unua prezentiĝis kiel komponisto, pianisto kaj kantisto Elena Puchova kun sia gasto Galina Staneŝnikova (ambaŭ RU), dum la dua parto brile plenumis operajn kaj operetajn ariojn Kateřina Kudláčková kaj Miroslav Smyčka (ambaŭ CZ) estante pianakompanataj de E.Puchova. Dum folklora adiaŭa vespero oni povis ĝui kantojn kaj dancojn de sakfluta ensemblo de Domažlice.

La kontenteco, kiu brilis de la partoprenantoj dum la adiaŭiĝo estis la plej bona aprezo por la organiza skipo, kiu diligente kaj sukcese laboris por la kongreso kaj al kiuj la Plenum-Komitato de SAT volas publike danki. Temis pri P. Chrdle, L. Karešová, J. Melichárková, A. Klementová, S. Chrdlová, M. Bloudek, J. Krupka kaj Z. Pluhař.

*Krešo Barković*

## ILEI-Konferenco en Karlovy Vary

Ĉirkaŭ 55 personoj el ĉiuj 5 kontinentoj aŭskultis prelegojn *Instruo de lingvo kaj instruo de gramatiko* (G. Mattos, prezidanto de AdE, Brazilo), *Edukado al paco* (M. Grosjean, Svisio), *Projekto INTERKULTURO* (M. la Torre, Italio), *Komputilaj helpoj al instruado* (M. Kovács, Hungario), *La fremdeco en ni: ekkoni antaŭjuĝojn kaj ilin prilabori* (S. Trenner, Germanio), *Netradicia lernolibro de Esperanto* (P. Chrdle, Ĉeĥio) kaj *Antonimoj kaj falsaj sinonimoj en Esperanto* (L. Mee, Britio).

Estis prezentitaj novaj kursoj *Pasporto al la tuta mondo* (L. Harmon, Usono, televida kurso), *Urso-kurso* (M. Jones, Britio), *Tendaraj tagoj* kaj *Okulo* (S. MacGill, Hungario). Paralele kun la prelegoj okazis seminarioj por B kaj C ekzamenoj. Kvinfoje kunsidis la komitato de ILEI, kiu akceptis du novajn regionajn sekciojn (Togolando, Katalunio), novan kasistinon (Kim-Lindblom Boo Mee, Svedio) kaj novajn kotizojn (14 eŭroj por A-landoj, 8 eŭroj por B-landoj). La konferenca rezolucio alvokas enkonduki en lernejan instruadon metodojn, kiel pace solvi konfliktajn situaciojn, kaj produkti filmojn kun tia temo kiel kontraŭpezon de filmoj plenaj de perforto. Dum ekskurso la konferencanoj vizitis urbojn Loket kaj Mariánské Lázně.




**Lernolibro por nova televida kurso de Esperanto preparata en Usono sub titolo** Tuta Pasporto.

## La Esperanto-rondeto en Opava

anoncas, ke ĝi finis kunlaboron kun iama Uzina Klubo Ostroj, nun Sindikata klubo Ostroj OKO en Opava kaj ne plu validas ĝia ĝisnuna adreso. Pro ŝanĝo posedanto de la klubo-domo oni ŝanĝis kondiĉojn por uzado de klubejoj, kiuj estas por la rondeto ne akcepteblaj. La rondeto memstariĝas kaj por sia agado ĝi trovis tegmenton en Matiční dům, kiun posedas Matice slezská. Esperantistoj en Opava do nun daŭrigas sian agadon kiel Esperanto-klubo Opava, la adreso de la sidejo estas Matiční dům, Matiční 2a, 746 01 Opava.

kov

## Pri vizito de anglaj infanoj ĉe ni

En jaro 1997 vizitis ĉeĥa infana E-grupeto Anglujon. En tiu ĉi jaro vizitis junaj anglaj gesamideanoj kun sia instruistino Jenny nin en Česká Třebová veturante al UK en Berlinon. Marde ĉeĥa kaj angla grupoj komune vizitis malgrandan vilaĝon Opatovice, de kie estas kelkaj niaj E-infanoj. Ni tra-rigardis duklasan vilaĝan lernejon, antaŭ-lernejon, ĉevalejon kaj banis nin en fiŝlago. Merkrede estis nia celo Moravia Karsto, kie niaj gastoj admiris grotojn. Multe al ili plaĉis ŝipveturado sur subtera rivero Punkva. Jaŭde ni komune vizitis deponejon de muzeo en Č. Třebová. Tie samideano Pištora montris al ni diversajn E-aĵojn kaj Betlehemojn en movo. Poste ni promenis tra Hory al lia kabano, kie kunvenis ge-rondetanoj el AMIKECO. E-infanoj dekla-mis kaj kantis, eĉ dancis. Poste ĉiuj rostis kolbasojn. Infanoj eĉ ne volis iri dormi.

Vendrede matene ambaŭ infanaj E-grupetoj veturis viziti Pragon. Sabate ni adiaŭis la anglan grupon kaj ili forveturis al Berlino.

Z. Novotná

## MUZEO DE ŠUMAVA EN SUŠICE

estas titolo de bildstrio kun 17 fotoj pri la muzeo de Sušice, kie estas ekspozicioj pri la vivo en antikvaj tempoj en la regiono kaj ankaŭ pri la vitro- kaj alumet-farado. La teksto aperis en la lingvoj ĉeĥa, angla, germana kaj dank' al nia membro Jiří Pěnek ankaŭ en Esperanto. Al interesatoj li sendos ilin kontraŭ 33 kronoj (25 Kč + 8 Kč sendokostoj en Ĉeĥio). La adreso: Muzeum Šumavy, nám. Svobody 40, 342 01 Sušice, tel. 0107 / 528856.

zh

## Vizitis nin Afrikano

Partoprenınte la ILEI-konferencon en Karlovy Vary, venis la 13an de aŭgusto laŭ invito de la loka klubo al Brunno (Brno) s-ro Kokou Sagbadjelou, prezidanto de Unuiĝo Togolanda por E-o, juna instruisto de elementa lernejo. Akompanate de Z. Hršel li travivis la semajnfinon en Somera E-Tendaro en Lančov, kie ĝuste okazis la 2-a renkontiĝo de iamaj SET-anoj. Lunde li atingis la daĉbienon de familio Hršel en Rudná, kiu servis kiel bazo por ekskursoj al vasta ĉirkaŭaĵo. Mardon ĝi estis Česká Třebová, kie sub gvido de s-ro J. Pištora li konatiĝis kun la Urba Muzeo (kaj ĝia unika E-Biblioteko) kaj pasigis la posttagmezon en la ĝardeno de s-ro Pištora kaj deko da gesamideanoj lokaj kaj eksterlokaj. Merkrede ĝi estis urbo Svitavy kun sia belega placo; tie la prezidantino de la loka klubo M. Minářová kun kelkaj klubanoj gvidis lin tra la urbo, muzeo kaj tombejo. En jaŭdo ni vizitis urbojn Letovice (tra la preĝejo gvidis nin la paroĥestro) kaj Březová, en vendredo Moravská Třebová kaj Jevíčko. La vizitanto ĝuis la vivon en esperantlingva familio, kiu siaflanke ekkonis multon el Afrika kulturo, precipe el la eve-lingva. Post sabatvespera reveno al Brunno venis dimanĉa adiaŭo en la stacidomo.

zh





## Vivjubileo de Věra Podhradská

La 13-an de aŭgusto festis la saman vivjubileon kiel Eva Pilarová kaj Karel Gott ankaŭ nia asocia kasistino kaj multjara asocia vicprezidantino Věra Podhradská, senlaca organizanto de niaj asociaj kongresoj kaj konferencoj. Kulmino de ŝiaj organizaj aktivadoj estis verŝajne la 81-a UK en Prago 1996, kie ŝi estris preskaŭ centpersonan regimenton da helpantoj. Ŝiaj someroj ĉiujare apartenas al SET Lančov dum ĝia tuta historio kaj rimarkebla estas ankaŭ ŝia agado en la loka klubo de Brno.

## Zdenko Křimský (1934-1999)

La 22-an de julio mortis en Mělník post nelonga malsano en aĝo de 65 jaroj Zdenko Křimský, iama sekretario de ĈEA (1973-1985). Kun li estas ligita grava periodo de disvolviĝo de nia asocio. Kun Esperanto li konatiĝis jam kiel studento en Náchod, sed lia plej fruktodona aktivado okazis post fondiĝo de ĈEA, en kiun lin engaĝigis ĝia unua prezidanto J. Vítek. Zd. Křimský liainstige akceptis funkcion de la asocia sekretario, kiun li plenumis ekster sia profesio en la tiama Regiona Investa Buroo. Liamerite la asocio akiris la oficejon en Jilská-strato en Praha, kiun li rekonstruigis kaj ekipis. Sian funkcion li plenumis tre ofereme kaj sperte, kio al la asocio alportis bonan prosperon kaj stabilecon. La asocion li reprezentis ankaŭ en la UEA-komitato (komence de 80-aj jaroj) kaj en diversaj internaciaj renkontiĝoj, nome en UKoj kaj Konsultiĝoj de SLEOJ (t.e. asocioj el landoj de socialismaj ŝtatoj). Tamen li kaŭzis kelkajn miskomprenojn kun iuj membroj de la asocio, kio rezultiĝis en krizo en la asocia gvidorgano, kiu kulminis aŭtune 1985. Post ĝia sukcesa solvo li tamen retiriĝis el ĉiuj funkcioj en ĈEA kaj malaliĝis de ĝi. Poste li membriĝis en SEA kaj kelkajn jarojn li aktivis en Praha kiel fako de SEA ne respektante teritorian agadon de landaj asocioj laŭ federacia principo de la ŝtato. Post politikaj ŝanĝoj en 1989 li fondis privatan firmaon Interhelpo en Praha profesie utiligante Esperanton.

Zd. Křimský, malgraŭ kelkaj dubindaj agoj ene de la movado, grave kontribuis al Esperanto kaj ĝia movado en Ĉeĥoslovakio.

V. Kočvara




**Red. rim.:** Post Křimský restis signifa raporto „Sociologia esploro de sintenoj al Esperanto" (Praha 1981, tr. J. Vondroušek), fotografa „Rememoro" pri la 4-a kongreso de ĈEA en Pardubice 1982 kaj reeldono de la vortaroj de fratoj Filip. Lia partopreno en eldonado de Starto kaj diversaj publikaĵoj en la tempo de lia sekretarieco restas kaŝita en anonimeco, ne indikita en la publikaĵoj. Konata estas lia enkonduko de reklamoj en Starto, pro kiuj li estis riproĉata de la membraro, sed dank' al kiuj estis Starto plurajn jarojn kvazaŭ sponsorata.

## Marjorie Boulton kaj William Auld jubileas

Du el la plej eminentaj Esperanto-verkistoj festas ĉi-jare sian 75-an datrevenon: Marjorie Boulton la 7-an de majo kaj William Auld la 6-an de novembro. UEA omaĝas la jubileon de siaj du honoraj membroj per la festlibro "Lingva arto", al kiu kontribuis entute 23 aŭtoroj. Aldonitaj estas ankaŭ la bibliografioj de Auld kaj Boulton, kompilitaj de Christian Cimpa. La belan grafikan veston de la libro prizorgis Francisco Veuthey.

## Eduard Tvarožek (1920-1999)

Kun bedaŭro mi devas anonci, ke la 9-an de aŭgusto nin forlasis en la aĝo 79 jaroj nia kara amiko kaj granda slovakia Esperanta personeco Eduard V. Tvarožek.

## Varvara Cvetkova (1910-1999)

La 13-an de aŭgusto 1999 en Peterburgo forpasis en sia 90a vivojaro dojeno de la ruslanda E-Movado Varvara Petrovna Cvetkova (1910-1999), Honora Membro de UEA, esperantisto ekde 1928.

## William Auld - prezidanto de Esperanta PEN-centro

Li anstataŭas kolegon István Nemere, kiu retiriĝas post naŭjara mandato. William Auld estis honorita per la titolo "La esperantisto de la jaro 1998" fare de "La Ondo de Esperanto", pro la granda eho kaŭzita de lia kandidatigo al Nobel-premio.

## LITERATURA FOIRO 30-jara

"Literatura Foiro" regule aperas jam la tridekan jaron: entute 170 numeroj estis ĝis nun eldonitaj! La kultura revuo, kiu festis sian arĝentan jubileon en 1994 per granda ekspozicio subvenciita de "Pro Helvetia", ekde ĉi tiu jaro rekordas kiel la plej longe kaj konstante aperanta beletra periodaĵo en la tuta historio de la Esperanto-kulturo.

## Nova estraro de GEA

Germana Esperanto-Asocio dum sia jarkunveno elektis novan estraron. Prezidanto nun estas D-ro Rainer Kurz. La ĝisnuna prezidanto Frank Stocker restis en la estraro. Cetere reelektiĝis Dieter Dungert, Marko Naoki Lins kaj Reinhard Pflüger.

## Pri lingvopolitiko

12. - 14. 11. 1999 la Societo pri Interlingvistiko okazigos en Berlino sian 9-an jarkonferencon, en kies kadro okazos kolokvo pri "Lingvopolitiko en Eŭropo". Pri la programo, prezoj kaj teknikaj kondiĉoj informas Detlev Blanke.

## Por lernejaj instruistoj

Ekde septembro funkcios en interreto la "Kvazaŭlernejo Tibor Sekelj", en kiu klasoj el la tuta mondo (jam 60) renkontiĝos kaj kunlaborados per Esperanto. Tio okazos kadre de ILEI-projekto nomata "Interkulturo" (vidu Starto 1/1999, p. 8), ĉar ĝi celas interkulturan edukadon en la lernejoj. Instruistoj, kiuj havas intereson aliĝi, povas anonci sin ĉe ILEI (m.latorre@uniroma3.it).





## Salutas Berlino

El la parolado de berlina ŝtatsekretario ĉe la oficiala akcepto en la urbodomo:

"Kiel membro de la honora komitato de via kongreso la ĉefurbestro de Berlino, s-ro Eberhard Diepgen, petis min transdoni al vi siajn treege korajn salutojn. Li tre bedaŭras ne povi veni hodiaŭ. *Mi* persone bedaŭras ne povi saluti vin en la lingvo vin ĉiujn liganta, Esperanto."

"Rimarkinda ĉe via kongresa temo ŝajnas al mi, ke vi malimplice metas en la malfonon de viaj pripensoj la eblajn sekvojn pozitivajn de tutmondiĝo, dum ĝuste ĉi tie en Germanio la nocio "tutmondiĝo" ofte havas negativan nuancon. Mi konsentas kun vi, ke la tutmonda interplekto de la ekonomio kaj la plidensigo de la tutmonda komunikado estas grandioza ŝanco por pli bona interkompreniĝo inter la popoloj. ... La tempo tiurilate laboras favore al la baza ideo de Esperanto."

Li donis superrigardon pri sia fako "scienco en Berlino" kaj tie vidas tri ĉefajn rilatojn al nia kongreso: "Unue ni kreis la juran kadron ... por enkonduki ankaŭ internaciajn akademiajn gradojn ... Due ni kreas internacian kompareblecon kaj agnoskeblecon de studorezultoj. Tio ege favorigas la movemon de studentoj. ... Berlino deziras grandan procentaĵon de eksterlandaj studentoj. Tio trie necesigas plifortigitajn klopodojn, enkonduki fremdlingvan instruadon, igi pli allogaj la vivkondiĉojn por eksterlandaj studentoj en nia urbo kaj inverse levi la socian kompetentecon de germanaj studentoj por aliaj kulturoj."

## Internacia Himalaja Renkontiĝo 2000

okazos en Nepalo (26.2.-7.3.2000) por konatigi tutmondan esperantistaron kun Nepalaj naturo kaj kulturo.

## Misuzo de la Jarlibro

Lastatempe multaj delegitoj de UEA ricevis anglalingvan leteron el Niĝerio kun propono pri "komerca kunlaboro" (transigo de enorma monsumo al la banka konto de la delegito kontraŭ granda maklerajo). La intencoj estas evidente krimaj. La Centra Oficejo nun klopodas malkovri, kiel la sendinto(j) havigis la Jarlibron. Tiucele ĉiuj, kiuj ricevis tian leteron, estas petataj sendi ĝin, kune kun la koverto, al la Centra Oficejo de UEA.

Osmo Buller
Ĝenerala Direktoro de UEA

## Urboprospekto de Erlangen

eldonita de la urba turisma oficejo en Erlangen estas sukceso de la loka E-Grupo. La tekston tradukis Ludeviko Robel. Postulu ĉe: Verkehrsverein Erlangen, Rathaus, Neuer Markt 1, DE-91052 Erlangen, Germanio.

## Ni tostu la verdan fortunon.

Kompakta disko kun 19 kabaredaj kaj bardaj kantojde Georgo Handzlik, Esperanta instruisto, eldonisto kaj kantisto, kiu kun akompano de gitaro prezentas proprajn kantojn sur scenejoj en Esperantujo, ĵus aperis en Pollando.

FOJE FRENEZULOJ SUKCESAS TIE, KIE NORMALULOJ EĈ NE PROVUS

Sylain Lelarge lanĉis la projekton "Indiĝenaj dialogoj", laŭ kiu indiĝenaj popoloj tra la mondo multe pli efike povus postuli siajn rajtojn, se ili povus inter si interkompreniĝi. Sufiĉas nur instrui al ili Esperanton kaj poste provizi ilin per komputiloj, por ke ili restu en daŭra kontakto. "Kompleta frenezaĵo!", mi estus dirinta - bonŝance Sylvain ne sekvis la opinion de normaluloj kaj la sekvo estas, ke de la 29-a de aŭgusto ĝis la 18-a de septembro en Nederlando okazas la unua kurso por reprezentantoj de 16 indiĝenaj popoloj (de Alasko ĝis Nova Gvineo). Kurso-materialo jam estas pretigita, kaj firmao, kiu donacos komputilojn, jam kontaktita.

Renato Corsetti

## Inaŭguro de ZEO

(trafikcirklo en Vendee)

Ĉefurbo de la departemento Vendee (okcidente de Francio), La RochesurYon havas Trafikcirklon ("Rond-Point") Zamenhof, kies inaŭguro okazos la sabaton 18an de septembro je la 10a horo. Bonvenaj estas ĉiuj esperantistoj kiuj trapasos tiun urbon (45 000 loĝ.), 60 km sude de Nantes, kaj ankaŭ bonvenaj estas gratulkartoj kaj mesaĝoj al la urbestro Jacques AUXIETTE, kies partopreno estas certigita. Posxtadreso :

Monsieur Jacques Auxiette
Maire de La Roche-sur-Yon
BP 829, FR-85021 La Roche sur Yon
Cedex, Francio

## La kasedo pri Zamenhof denove aĉetebla

Ĵus reaperis la fame konata kasedo "Ludoviko Zamenhof - la aŭtoro de Esperanto", kiu enhavas 2 originalajn paroladetojn de Zamenhof (oni povas aŭdi Lian veran voĉon!), krome oni povas aŭdi la kongresan paroladon de L. Zamenhof el la unua kongreso en 1905, kiun laŭtlegas varsovia aktoro Andrzej Tomecki, kiu ankaŭ kantas en E-o kantojn el la epoko de Zamenhof, kiuj estis tiutempe popularaj en Varsovio. La kasedon vendas la Libroservo de UEA.

## Verkoj pri islamo senpage

la estraro de la Universala Islama Esperanto-Asocio disponigas senpage al petantoj jenajn verketojn:
- s-ro Muhammad (B.A.) la vivhistorieto de la islama profeto
- Alif Laam Miim - la unua parto de la islama sankta libro, la Kuraan
- Kuraana leciono (Facila traduko de la unua parto de la Kurano en 10 partoj)
- Tezoj pri Islamo (respondo al dek demandoj de neislamanoj)
- Lasta parolado de Lasta profeto (bazaj dokrinoj de Iskamo)

Pro la ekonomia situacio en Pakistano estas tre malfacile por niaj lokaj samideanoj pagi sendokostojn al eksterlando. Pro tio, kvankam la verketoj mem estas senpagaj, bonvolu sendi unu internacian respondkuponon por chiu verketo, kiun vi mendas.
Universala Islama Esperanto-Asocio, Informa centro, Esperanto Chowk, Lower Mall, Murree, 47150 Pakistano





## Esperanto-periodaĵoj aboneblaj en Ĉeĥio

Komisiito: Vladislav Hasala, A. Dvořaka 1, 696 62 Strážnice

| | |
|---|---|
| Afrika vekiĝo | Kč 108,- |
| Amikeca reto | Kč 105,- |
| El popola Ĉinio | Kč 575,- |
| Eventoj | Kč 668,- |
| Heroldo de Esperanto | Kč 540,- |
| Informilo de AEH | Kč 100,- |
| Interligilo (poŝtistoj) | Kč 95,- |
| Juna amiko | Kč 130,- |
| Komencanto | Kč 361,- |
| Kosmos | Kč 204,- |
| La Gazeto | Kč 550,- |
| La Kancerkliniko | Kč 443,- |
| La Merkato | Kč 376,- |
| La Migranto | Kč 80,- |
| La ondo de Esperanto | Kč 345,- |
| La verda lupeo | Kč 392,- |
| Literatura Foiro | Kč 505,- |
| Litova Stelo | Kč 341,- |
| Monato | Kč 561,- |
| Monda solidareco | Kč 60,- |
| Oomoto | Kč 250,- |
| Osiek | Kč 115,- |
| Penseo | libervola |
| RET-INFO (en interreto) | Kč 429,- |
| Riveroj | Kč 305,- |
| Sennaciulo | Kč 570,- |
| Tutmonda scienco kaj tekniko | Kč 461,- |
| *Esperanto-telefonkarto* | Kč 350,- |

## LIBROJN SENPAGE

donacos eksa esperantisto (prefere persona transdono) Mgr. Jan Smejkal, Břevnická 1584, 583 01 Chotěboř, tel. 0453/621 761:

Kalocsay-Waringhien: Plena Analiza Gramatiko de Esperanto
Čapek, K.: Libro de apokrifoj
Seppik, H.: La tuta Esperanto
Zawiegski, J.: Vizito de Prezidento
Wells, J.: Lingvistikaj aspektoj de E-o
Mac Dermott, M.: Apostolo de libereco
Bezruč, P.: Sileziaj kantoj
Adam, Z.: Historio de E-o
Gvidlibro por supera ekzameno
Zamenhof: Proverbaro
Kamaryt: Historio de E-movado en Ĉeĥoslovakio
Valano, J.: Ĉu li bremsis sufiĉe?
Vortaroj: hungara-Esperanta, hungara-ĉeĥa, germana-bulgara, rusa-Esperanta, rusa-ĉeĥa, ĉeĥa-rusa, norvega-germana, bulgara-Esperanta, Esperanta-rusa, Esperanta-germana.

## VOĈOJ DE ANIMALOJ

*Ĉiuj animaloj blekas, sed plej famaj havas ankaŭ specialajn esperimojn por siaj voĉoj:*

La hundo bojas, graŭlas, hojlas kaj jelpas, lupo hurlas kaj ululas. Ankaŭ strigo ululas. Kato miaŭas kaj ronronas (ŝpinas). Koko kokerikas, kokino klukas kaj kokido pepas. Ansero gakas, korvo grakas, kolombo kveras kaj rukulas, alaŭdo trilas, meleagro glugłas. Ĉevalo henas, azeno iaas, kapro mekas, ŝafo beas. Porko gruntas, porkido kvikas. Bovo muas, leono roras (ambaŭ muĝas). Grilo ĉirpas, rano kvakas, musoj kaj paseroj kvivitas. Serpento siblas, muŝo zumas. Paviano stridas, akcipitro kriĉas kaj ŝrikas.

(laŭ Jaroslav David)

Odesílatel:


Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1
**Internet:** cea @ tnet. cz
www.kuk.cz/cea/


**☆ STARTO ☆**

# NOVINOVÁ ZÁSILKA

**Poštovné hrazeno v hotovosti u pošty 746 01 Opava 1**


Periodikum Českého esperantského svazu (30. ročník)
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto
Členská evidence a změny adres: Květa Krajíčková, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (30-a jarkolekto)
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio
Abonprezo: 9 eŭroj (se aerpoŝte: + 2 eŭroj)
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, e-mail: starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto
Presis: OPATISK Opava

Podávání novinových zásilek povoleno
Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

ISSN 1212-009X